

La lando de regino Maud (I)

Novelo de Jorĝa Danovskaĵa

Verŝajne, ŝi estis bela, la reĝino, se tutan landon oni baptis laŭ ŝia nomo. Kial ŝi ne estu bela? Ne ĉiuj ja reĝinoj estis tiom hidaj, kiel Elizabeto I.

Maud, verŝajne, estis alta kun blondaj haroj kaj bluaj okuloj: tiom bluaj, tiom profundaj, ke, se longe rigardi ilin, oni povis vidi propran koron. Verŝajne, ŝi havis sveltan talion kaj varmajn lipojn, kvazaŭ matena suno. Verŝajne, laŭte susuris ŝiaj pompaj jupoj, broditaj per arĝento, kiam ŝi malsupreniris en gardenon laŭ malvarmaj ŝtupoj de sia palaco. Tie malsupre atendis ŝin la aŭdaca maristo. Li estis alta, nebela, kun malhela vente brunigita haŭto, kun grandaj manoj, maldelikataj pro peza marista vivo, salitaj per ĉiuoceanaj ventoj. Ĉirkaŭ lia kolo estis ligita silka tuko kun broditaj rozoj kaj ora monogramo.

Li rigardis en la okulojn de sia suvereno, kaj lia koro laŭte batis ie sub la gorĝo mem.

Kaj poste ree tremis la veloj sub vento, simile al flugiloj de gigantaj mevoj; la ŝipprandojn furioze frapis la verdaj ondoj; bruis uragano, rompante ŝipojn, kvazaŭ nuksoŝelojn. En la arda aero susuris palmoj per rigidaj folioj. Sunbrunigitaj indiĝenoj disbatis kokosnuksojn, kaj seka arda aero de dezertoj — garmatano — pelis flokojn de ruĝa polvo laŭlonge de Gvineo bordo, kaj la sablo nube ŝvebis en horizonto.

Kaj poste denove iĝis malvarme. Ĉiele arĝentaj nuboj memorigis ion dolore konatan, senfine karan. Sed la vento ŝiris la velojn, kaj la ŝipo iris suden. Malproksime postrestis landoj de la indiĝenoj, la brulanta suda ĉielo. La horizonto estis tegata de blanka vualo. Kaj fine la deĵoranta vaĉano,

kiu sidis supre en tradicia barelo, ekkriis: « Tero! ». La aŭdaca maristo, sufokiĝante pro feliĉo, pensis: « Mi donos al la lando nomon de mia reĝino. Eterne konservos la memoron pri ŝiaj bluaj okuloj la malvarmaj rokoj, kovritaj de neĝo. »

Laŭ la moro de ĉiuj vojaĝuloj oni surterigis botelon kun skribaĵo, metis ĉirkaŭe ŝtonojn, trinkis vinon el netuŝeblaj provizoj kaj ekskursis laŭ la returna vojo.

La maro kolere renkontis kuraĝajn navigantojn, ondoj transruliĝis la ferdekon. Kvazaŭ indignitaj dioj, ĉirkaŭe leviĝis blankaj abruptoj. La ŝipo estis portata malantaŭen al la glacioj de Antarktido. Ĉe ĝiaj bordoj embuskis la ŝtormo, kaj la skuita ŝipo kun vunditaj flankoj en multaj lokoj kaj flikaĵoj estis ŝetata kontraŭ ŝtonoj.

Kaj neniu homo revenis hejmen, neniu rakontis pri la malproksima ŝipiro.

En skvalo de popolaj ribeloj estis pereanta la ĉarma reĝino. La reĝinon oni ne kompatis. Ŝi estis subpremanto. Kiom valoras ŝia bonkoro? Ŝia popolo vivis same malbone, kiel en aliaj reĝlandoj. Sed oni kompatis la virinon kun granda amo en la animo, belegan, kiel fabelo floro de Afrikaj oazoj — lotoso, kiu havis malfeliĉon naskiĝi reĝino. « Ah! Kial mi ne naskiĝis simpla kudristino! » — verŝajne, pensis ŝi en sia lasta horo. Kaj tiam ŝi rememoris, eble, brunan, venteharditan vizaĝon kaj ardajn tenebrajn manojn kun kruda haŭto.

Kaj en glaciaj vastoj de l'Antarktiko por eterne restis la lando, portanta ŝian nomon. Hurlis la ventoj, tintis neĝoblovadoj neeltebla malvarmo descendis de la senindulga griza ĉielo. Kaj, verŝajne, al homo, kiu post